

LUMBILDA SERVO DE SEJM EKLUMU!

Dum SEJT-16 estis akceptita propono organizi en kadro de SEJM tiel nomatan lumbildan servon, kies tasko estas disponigi lumbildojn pri interesaj E-arangoj, pri SEJT-oj, E-ekspozicioj, renkontiĝoj, kluba agado ktp. La SEJT-anoj-16konvinkiĝis dum la demonstrado de koloraj lumbildoj, faritajn de V.Cvetkova kaj de Klajpeda E-klubo, pri tio, ke lumbildoj povas multon rakonti pri E-eventoj ne nur al esperantistoj, sed ankaŭ al alia publiko. Kaj tiom pli grave: lumbildoj povas servi kiel bonega propagandilo de E.

Kiel ni organizu la laboron de LBS? SEJM dume ne havas proprajn lumbildojn, posedantoj de tiuj estas E-klubo kaj apartaj homoj eĉ. Ĉu kluboj konsentos donaci jam faritajn lumbildojn al SEJM? - mi dubas. Eble kopion aŭ superfluaĵajn ekzemplerojn oni povus doni, sed dume estas nereale esperi je tio. Tial mi proponas jenan provizoran solvon de tiu-ĉi demando.

Klubo tuj sendu al mi liston de temoj, pri kiuj ili posedas lumbildojn kaj kiujn ili povas pruntedoni por aliaj kluboj. Post la kompilado de listo pri ĉiuj temoj mi ĝin multobligos kaj dissendos al ĉiuj kluboj, por ke ili faru mendojn laŭ certaj kondiĉoj:

1. Ricevitajn lumbildojn (plie LB) kluboj promesas ne difekti kaj teni ĉe si ne pli ol 2 semajnojn.

2. LB-jn la kluboj sendu al aliaj kluboj nur laŭ la indikitaj de mi adresoj kaj mendoj.

3. Samtempe kun forsendo de LB al alia klubo la sendinto informu min per poŝtkarto pri la dato de la forsendo kaj la nomo de klubo-ricevinto.

4. Klubo, kiu tenos senpermeso ĉe si la LB pli ol du semajnojn, perdos por duonjaro rajton ricevi LB plue.

5. Klubo, perdinta ricevitajn LB, estos devigata rekompenci trioblan prezon de la lumbildoj kaj estos punota de la SEJM-estraro per poentoforprezo.

Por kluboj, posedantaj LB, ankaŭ estas jena peto:

1) al ĉiu sendota serio da LB aldonu liston-katalogon, en kiu koncize klarigu la enhavon de ĉiu aparta bildo;

2) ĉiu bildo devas havi almenaŭ numeron, la saman kiel en la listo. Kelkaj SEJM-anoj, ekz. V.Cvetkova, skribas sur ĉiu bildo ĝian enhavon, jaron de la fotado, la nomon de serio kaj numeron. Tio estas ne nepre sed dezirinda, ĉar estas tre oportune dum demonstrado anonci la enhavon de bildo.

Ĉe mi estas pretaj 2 serioj da LB: "SEJT-16" kaj "Neptunfestoj dum SEJT-16". Kluboj jam povas mendi ilin.

Kaj laste: se iu klubo havas aliajn proponojn rilatantajn la organizon de la laboro de nia LBS, bonvolu tuj skribi al mi. Mia adreso estas:

652870 Mejdureĉensk-14 Kemerovskaja obl.,
pr. Stroitelej 10, kv. 9.

Estro de la lumbilda servo de SEJM
S.E.Kotlarov (Mejdureĉensk)

MIA LABORO KONSISTIS EL DU PARTOJ...

El la raporto de la estro de bibliografia servo al la v/p pri fakaj aferoj

"Mi sendas al vi leteron de V.Cvetkova, ĉar ĝi ne sukcesis trafi la Konferencon. Ŝi faris grandegan laboron kaj, bedaŭrinde, sola. Ŝajne, dum la tendaro nemultaj ekinteresiĝis pri tiu-ĉi bibliografio. Valeria, vere, multe laboregis, kaj tiu-ĉi laboro postulas multe da tempo, helpantojn, kaj, certe, publikecon. Ŝi plendas, ke neniu helpas, neniu atentas, ke ŝi ege laciĝis. Necesas iel fini tiun-ĉi laboron kaj multobligi la sliparon por SEJM-kluboj."

El letero de S.Smetanina (Ŝuja, Iv.reg.)

Mia laboro konsistis el du partoj:

1) mem laboro: kolektado de slipoj, korektado de libraj priskriboj, multobligado (mane) po unu slipo por la alfabetaj kaj laŭsistema katalogo. (Poste necesas ankoraŭ multobligi, ĉar en la laŭsistema katalogo unu titolo povas esti en kelkaj lokoj);

2) eltiro de slipoj el diversaj urboj. Tio estas la plej malfacila parto de la laboro.

I. Pri kolekto de slipoj el aliaj urboj.

Mi sendis dum la jaro 32 leterojn, havis telefon parolon kun Moskvo kaj uzis por kontaktoj la novjaran kaj majan renkontiĝojn. Pro obstina silento de riganoj mi estis devigita veturi la 8-9 de aprilo en Riga-n kaj de mateno ĝis vespero dum du tagoj ordigi la rigan parton de la katalogo. Tiuj estis miaj libertagoj. Dum la vojaĝo mi trovis novan kontakton kaj "trovis" ankoraŭ nepriskribitan katalogon en fremdlingva biblioteko. Ne ĉiam respondoj estis ricevitaj je miaj leteroj. Ekzemple, ne respondis V.Andreev (Ĉelabinsk), J.Lupickij (Ĥarkov), V.Kulikov(Omsk), N.Ŝĉerbakova (Kosino), M.Kirilov (Moskvo) ne respondis, kvankam ili promesis helpi. Mi petis al A.Ĥarkovskij (Moskvo) resendi la duajn ekzemplerojn de slipoj, sur kiuj mi petis skribi la cifrojn (la slipoj estas leningradaj) kaj ricevis nek slipojn (ili kuŝas ĉe li jam la duan jaron) nek respondon.

Ankaŭ mi sendis leteron al Rubljov, kiu loĝas en Odeso, (iu diris al mi, ke li havas ian bibliografion), sed li ne respondis pro iu kaŭzo. Ankoraŭ mi sendis leteron al la Esperanta biblioteka asocio, sed ĝis nun respondo forestas; plej verŝajne, ke ili ne ricevis la leteron.

Mi povas aldoni, ke ĉiam bone respondadis Lapienyte(Klaipeda), D.Galalova(Taŝkent), Miŝĉenko(Kiev).

La nuna stato estas jena. Mi ricevis slipojn el urboj:

- 1) Vilnius(Grabejite Grajina) - ne plene;
- 2) Riga(Medinŝ, Kalninŝ kaj parte de Lige Beizvua) - ne plene;
- 3) de Zita Lapienyte el urboj Klaipeda, Panevėžys, Šiauliai;
- 4) Ĥarkovo - nur el unu biblioteko. Oni devas alsendi ankoraŭ el du, sed Lupickij silentas;
- 5) Novosibirsko;
- 6) Tallin (ne indikis el kiu biblioteko);
- 7) Kaunas (A.Vaitkus - la laboro estas farita plej bone, la slipoj estas eĉ presitaj kaj venis tre rapide!);
- 8) Kievo (Miŝĉenko);
- 9) Permĵ;
- 10) Leningrado.

Plej malbone statas la aferoj en Moskvo, ĉar tie estas 4 grandaj bibliotekoj, kie estas E-libroj. Al mi proponis kunlaboron S.N.Kuznecov; laŭ liaj vortoj li komencis la saman sed pli vastan laboron en moskvaj bibliotekoj (pri artefaritaj lingvoj, ne nur pri Esperanto). Sed dum pli ol du monatoj mi nenion de li havas. Sen helpo de moskvanoj mi devus sidi la tutan ripoztempon en iliaj bibliotekoj. Ja tion oni nomas nia komuna afero! Sed sen moskvaj bibliote-

koj mi ne povas komenci fari la laŭsisteman katalogon. Nur post kiam la laŭalfabeta katalogo estos laŭeble plenplena, nur tiam mi povas detrui ĝin por fari la laŭsisteman, ĉar, se eniros multaj novaj libroj, mi denove devos fari novan numersistemon (numerordon). Tio ne estas facila laboro, ĉar jam nun nur la rusa parto enhavas ĉirkaŭ 400 slipojn.

Mi nun ne skribas, kiom da slipoj mi ricevis el ĉiu urbo, kvankam mi pritaksos ilian laboron. Estas mia eraro, ke mi tuj ne komencis enskribi, kiom da slipoj (aŭ titolojn en listo) mi ricevis.

Sed la laboro estas daŭrigata, kaj venontjare ĉio estos klare kaj en ordo.

II. Pri la leningrade parto.

La rusa parto estas preskaŭ tute preta laŭ katalogoj de du bibliotekoj. Baldaŭ mi povas komenci korekti la Esperantan parton kaj la alilingvan. Estus bonege trarigardi la katalogon flanke de prilibra bibliografio, sed la laboro estas tro granda kaj ne por unu homo. Sufiĉos serĉi en nia katalogo librojn, trovigantajn en aliaj bibliotekoj, eble ili ne eniris hazarde laŭsisteman katalogon, kiu estis bazo por mia alfabeta katalogo. Kiam estos plene kompilita la alfabeta katalogo, mi tiam komencos la laŭsisteman, verŝajne jam post unu jaro (moskvanoj malhelpas).

III.

Nun mi pensas, ke mi povas taksi tiel: 50 slipoj - 5poentojn.

Vilnius	19 poentojn	Kiev	20 poentojn
Novosibirsk	10 "	Riga	20 "
Harkov	6 "	Kaunas	5+2 (2 pro la bone farita laboro)
Tallin	9 "		

Mi opinias, ke ankaŭ mi skribis ne malpli ol 200 slipojn. Krome, alia laboro simple ne estas esprimebla per poentoj, ĉar ĝi postulas amason da tempo. Fakte nun mi okupiĝas ĉiutage pri la katalogo. Nu, tio ne gravas.

Ankoraŭ mi ne estas kontenta pri la ricevitaj slipoj - multajn mi resendis por finprilaboro.

Mi opinias, ke povas esti premiitaj almenaŭ per etaj donacoj:

- 1) Grabejite Grajina 232009 VILNIUS-9, Basanavičius 26-2;
- 2) Algirdas Vaitkus 233009 KAUNAS -9, Darjelio 11-45;
- 3) Miščenko Vladimir 252028 KIEV-28, pr. Nauki 142/1,

k. 14, kv. 35/5.

La laboron mi, kompreneble, daŭrigos.

V.Cvetkava (Leningrad)

BASETA MALOLDULO TRISTIS DUM HUMIDA PRIMAVERO

Esperantistoj estas multnacia popolo, kiun komunigas la lingvo Esperanto. Pro tio estas tute komprenebla la zorgo de E-istaro pri la sorto de nia lingvo, pri ĝia pureco, pri vojoj de ĝia evoluo.

Ĉi-somere en SEJT-16 preskaŭ ĉiuvespere kolektiĝis aretoj da diskutantoj, inter kiuj ofte aŭdeblis la voĉo de la aŭtoro de tiuj-ĉi linioj. Ni diskutadis arde - ĝis personaj ofendoj, ĝis perdo de parolkapablo. Diskutantoj ne aŭskultis oponentojn, spertaj veteranoj solide konservis neŭtralecon, pro tio diskutoj finiĝis plej parte per nenio. Diskutintaro skismis je du partoj - "konservatuloj" kaj "pliboniguloj".

La pli ardaĵ el la pliboniguloj asertis:

- Ju pli multe da vortradikoj akceptos E-to el aliaj lingvoj, des pli bone!

Tuj el ili tuj konstruadis novajn vortojn, senprokraste "plirigigante" E-ton. Nur la nokta mallumo kaj ludoj apud la ĝojfajro ĉesigis la diskutojn.

Al mi la nokto tamen ne donacis trankvilon. En la mallumo de la tendo daŭriĝis diskuto, kaj jam en duondormo mi kvazaŭ aŭdis efektiviĝintajn proponojn de la pliboniguloj: "Mi geos al ŝopo por baji bredon..." kaj "Mi geos al ladeno por kaŭfi brofon..." (Tio estas angligita kaj germanigita frazo "Mi iros al vendejo por aĉeti panon...").

Mi vekigis, kovrita de malvarma ŝvito, kaj konsolis min per tio, ke la frazo, titolanta mian artikolon, konstruita el PIVaj vortoj tamen estas same sovaĝa kiel fremda al Esperanto.

Ni rememoru, kiel komenciĝis tiu-ĉi tragedio. Antaŭe aperis "malmaluloj", kiuj subite ekdeziris el E-to bonegan sufikson "mal", kaj enigis abomenajn vortojn "febla", "tarda", "lanta", "turpa", "pigra" ktp. Tiaj "kurtaj" (mallongaj) aĉaĵoj estis kvazaŭ ponarda bato en la bruston de nia kara lingvo! De unua rigardo povas ŝajni, ke la danĝero al la lingvo ne estas tro granda. "Temas ja pri enkonduko de 20-30 da novaj vortaj radikoj", - diras la pliboniguloj. Tamen ni ne forgesu, ke E-to bazas sin je logiko, kaj la komenciĝanta proceso ne povas finiĝi. Oni volonte imitos la malbonan ekzemplon. Estos enkondukataj kelkaj centoj da tiaj "malmalaj" vortoj. Ni rimarku, ke tiuj-ĉi vortoj estas tre oftaj kaj pro tio nepre lerneindaj, kaj pensu: kio do restos de la plej grava kaj alloga eco de Esperanto - de ĝia facileco?

Se daŭrigi same laŭ la logiko, la "pliboniguloj" daŭrigos sian aĉan aferon per ekstremo de aliaj afiksoj kaj, geje kriaĉante: "Pusu la falanton!" - finmortigos la Zamenhofan Lingvon. Tute pravis A. Vajtilaviĉus, kiu skribis, ke "neologismoj estas kancero de Esperanto".

"Haltu! - oni diros al mi, - Vi eble deziras bremsi la evoluon de la lingvo? La vivo antaŭmarŝas, kaj pro tio estas necesaj ankaŭ ŝanĝoj en la lingvo."

Kion eblas respondi al bravuloj? Mi povas nur proponi evoluigi iun nacian lingvon, ekz., por ne tre longeserĉi, la rusan. Ili bonvolu same kuraĝe anstataŭigi la vorton "korova" (bovino) per la bone sonanta "ku" aŭ "kaŭ", la mallongan "toj" uzi anstataŭ "igruŝka" (ludilo) aŭ ion similan. Se tiu kuraĝulo evitos frenezejon aŭ piedbatojn, kaj estos nur priridita, li povos sin nomi feliĉulo. Mi opinias, ke por tio kuraĝo mankas. Ili nur povas facilanime injekti venenon, ĉar Esperanto dume ne havas sufiĉe da fortoj por kontraŭstari.

"Pliboniguloj"! Havu do kompaton al nia kara lingvo. Ĝi havis malfacilan junecon, oni kondamnis kaj persekutis ĝin. La mondo akceptos ĝin, se ni konservos ĝian facilecon. Ĉiu neologismo (senbezona nova vortradiko) kostos milojn da perdotaj adeptoj, kiuj devas veni en niajn vicojn.

Ni tamen ne respondis al la rekta demando, ĉu devas E-to evolui. Jes, nepre devas! Tamen la vojo de la evoluo estis jam antaŭvidita, kaj ĝi estas montrita al ni per la simplaj 16 reguloj de la Fundamento. Klaraj kaj precizaj ili donas al ni eblecojn, pri kiuj naciaj lingvoj eĉ reŝi ne povas. Pri kvanto da vortoj ni ankaŭ ne bezonas zorgi - ni ne uzas eĉ trionon de vortoj, kiujn eblas konstrui laŭ la fundamentaj reguloj.

Sur mia skribotablo kuŝas letero de mia kamarado. Ricevinte mian tradukon de unu rakonteto, li riproĉas min pro uzado de vortoj "aŭtunis" kaj "belegas". "Tiu-ĉi vortoj, - skribas li, - ne estas tradukeblaj en la rusan, anglan kaj germanan lingvojn." Eble. Tamen pri tradukoj en naciajn lingvojn lingvojn zorgu lingvistoj de tiuj-ĉi lingvoj. Esperanto ne kulpas, ke ĝi estas pli esprimriĉa ol naciaj lingvoj. Ni kulpas, ke ni ne uzas plene E-on. Krome ni rememoru: ESPERANTO NE HAVAS ESCEPTOJN. Tre grava, ora regulo! Neniu lingvo en la mondo samas E-ton tiurilate. Ni povas diri: "li estas aktiva" aŭ "li aktivas", "mi estas fiera" aŭ "mi fieras", "vi pravas", "ni kulpas"... La vicon da ekzemploj eblas daŭrigi senĉese, ĉar ni prin-

cipe rajtas formi verban formon el ĉiu vortradiko. Same kiel "malnas", "urĝas" rajtas ekzisti vortoj "belas", "bonas", "bonhumoras", "sinceritas" ktp. Pro kio oni malpermesu tiuj-ĉi vortojn, tiajn formojn? Se iu dezirus fari tion, li bonvolus: 1) forstrecki el la Fundamento la menciitan regulon pri esceptoj; 2) precize listigi la verbiĝeblajn vortotradikojn de E-to.

Certe, la samon pri konstruo de adjektivaj kaj aliaj formoj de ĉiu radiko. Mi aŭdas oponojn: bonvolu traduki iulingven "libras" aŭ "paseras"... Mi povas nur respondi, ke ~~neniu~~ lingvo povas esti modelo por E-to, ĉar ĝi estas senkompare pli riĉa ol kiu ajn nacia lingvo. Ĉiu nacia lingvo havas milojn da radikaj formoj, kiujn necesas lerni parkere. Nia juna lingvo donas al ni rajton libere kaj kuraĝe krei novajn formojn, sed laŭ la REGULOJ de la Fundamento! Mi kredas, ke la estonta homaro parolante kaj pensante E-te sentos kaj uzos E-ton duoble kaj trioble pli plene ol ni. Tamen ankaŭ por iliaj posteuloj restos "rezervo de stabileco", el kiu ili ĉerpos novajn freŝajn formojn. Ni ne kulpigu E-on, ni mem kulpas, ke tro ŝpareme kaj timeme uzas la riĉegan fonton de E-to.

Mi volas nun konkludi. La vivo marŝas antaŭen. La lingvo devas evolui. Tamen ĝi evoluu laŭ la reguloj de la Zamenhova Fundamento. Kontraŭ fikreulojn, intencantaj enkonduki en E-ton fremdajn vortotradikojn, ni devas batali same arde, kiel Lenin batalis kontraŭ la reviziistojn de la marksismo. Arde kaj senkompatate!

Se diri pri konkretaj proponoj, mi povas nur ripeti saĝajn kaj utilajn proponojn de A. Vajtilavičius:

1) ne agnoski kaj bojkoti fikreaĵojn ~~kiuj~~ de "malmaluloj, similajn al la vortoj en la titolo de tiu-ĉi artikolo;

2) bojkoti (ne abon) E-revuojn, kiuj amase uzadas tiujn aĉaĵojn;

3) perletere esprimi al ties redakcioj indignon pri malpurigo de E-to;

4) proponi al la Akademio de E-to oficiale forigi kaj malpermesi uzadon de centprocente senbezonaĵaj sinonimoj.

Pereis Ido, mortis ĝiaj idoj kiel Occidental, Novial, Interlingua kaj aliaj kelktagaj lingvetoj. Sed vivos kaj prosperos Esperanto - pura, fundamenta! Mi kredas, ke baldaŭ ĉesos "infana malsano de maldekstreco", kaj ni feliĉe forgesos pri mornoj, lantoj, oldoj, pigroj kaj similaj aĉaĵoj. Nur neologismoj, malbena serpento, povas mortigi la esperon, ke nia kara Esperanto venkos kaj prosperos.

G. Gercikov (Talgar)

Universala Esperanto-Asocio
prezidanto

13 oktobro 1974

Al s-ro Boris Kolker

Kara amiko!

Korajn dankojn pro via afabla letero kaj pro la ekzemplero de "Moscow news" kun la informo pri Esperanto. Vi meritas multajn gratulojn pro via trafa laboro.

Sciu, ke nia Estraro staras preta fari ĉion eblan por helpi al la E-movado en via lando. Tiurilate mi aparte notas viajn sugestojn. Dankon ankaŭ pro via preteco helpi al ni.

Kopion de via letero mi sendos al nia estrarano pri landa agado, d-ro Werner Bormann, kaj al la nova Aganta Direktoro de CED d-ro Jonathan Pool, kiu eble dezirus kontakti vin pro viaj profesiaj interesoj.

Kore

Humphrey Tonkin.

Petropavlovsk-na-Kamĉatke

Karaj gekamaradoj!

Traleĝinte la statistikon de SEJT-16, mi, ŝajnas, trovis unu erareton. Nome: laŭ Malyj atlas SSSR (Moskvo 1973) la urbo Briĉany troviĝas en nordo de Moldavio. Do en SEJT-16 estis partoprenantoj ne el 9, sed el 10 uniaj respublikoj. Malgraŭ tiu-ĉi erareto permesu al mi esprimi mian opinion, ke kiel la statistiko tiel same ĉiuj numeroj de "Aktuale" estas interesaj, bone preparitaj, aferecaj kaj aferemaj.

Amike

A.Natinj

Siktivkar*

Karaj gesamideanoj!

Ni estas tre dankemaj al vi pro via gratulo kaj afabla bondeziro. Reciproke ni deziras al vi grandajn sukcesojn en via laboro por E-to. Ni opinias, ke por ni estos tre utila pli bone kontakti kun vi, ĉar vi estas jam sperta klubo.

Ni tre bone utiligis viajn afiŝojn pri E-to, kiam organizis E-vesperojn: du en la universitato kaj unu en lernejo, kien nin invitis anoj de la lerneja Klubo de internacia amikeco.

En tiu-ĉi jaro ni pli aktivigis: estis presita artikolo pri E-o en nia respublika junulara gazeto "Molodjoĵ Severa", en la respublika gazeto "Krasnoje znamja" aperis sciigo pri E-vespero. La vesperon ni organizis kune kun klubo-magazeno (ili helpis al ni per E-rusaj vortaroj). Tiun-ĉi E-vesperon oni montris televide.

Ĉi-jare ni organizis du E-kursojn, kie lernas 65 homoj: studentoj, instruistoj de la universitato, lernantoj, laboristoj. Dank' al tio, ke en niaj kursoj studas du radioparolistoj, ni faris dekminutan radioelsendon kun koncerto en la respublika radio. Rezulte oni jam skribis al ni el multaj lokoj de nia respubliko. Ni, bedaŭrinde preskaŭ ne povas helpi per lernolibroj, sed sendas al ili la adreson de la koresponda servo kaj tenas kontakton. Ni opinias, ke en estonto ne nur Siktivkaro estos "verda oazo", sed ankaŭ la tuta respubliko. La estraro de la universitato rilatas al ni sufiĉe favore, eĉ pagas al la kursgvidantoj; tre bone rilatas al ni la estraro de la fremdlingva katedro. Nun ni vastigas niajn korespondligojn, esperas ekkontakti kun la urba packokomitato, jam kontaktas kun la Societo de soveta-bulgara amikeco. E-istoj regas en la universitato la Klubon de internacia amikeco, ĝia prezidanto Sergej Gamzin estas tre aktiva E-isto. Ni havas propran ĉambron. Nun nia delegacio estas en Leningrado; ni esperas, ke tiu-ĉi ekskurso donos siajn fruktojn. Ni do havas ĉion por efektiva laboro.

Ni abonas multe da revuoj ankaŭ "Esperanto-n", la libroservo de UEA sendis al ni 16 librojn el "Internacia E-biblioteko" kaj "Amuzajn dialogojn" kontraŭ tri niaj E-rusaj vortaroj. Nia biblioteko riĉiĝas: nun ĝi enhavas preskaŭ 60 titolojn.

Ankoraŭ ni planas kune kun la fremdlingva katedro organizi dum la vintraj ferioj unusemajnan tendaron, similan al la esperantista, sed tie estos ankaŭ ankaŭ rondetoj pri aliaj lingvoj, sed dominos certe tiu de E-lingvo. Tiu-ĉi tendareto estos en iu turisma bazo. Ni petas tiujn, kiuj jam havas sperton en similaj aranĝoj helpi al ni en kompilado de la programo, doni konsilojn.

Jena estas nia laboro. Bonvolu skribi pri la via, pri viaj planoj. Niaj korespondeadreso estas:

1. Siktivkar, Gosudarstvennyj universitet, Klub internacianoj-druĝby, Esperanto.

2. 167018 Siktivkar-18, 5 m-n 84-38, Ŝtraler Oleg Franceviĉ.

O.Ŝtraler (Siktivkar)

*La artikolo estas eltiro el letero al la Barnaula E-Klubo (Red.)

KIEL UZI LA INFORMFOLIETON "LAŬ ESPERANTO-MERIDIANOJ"

Laŭ la decido de la VIII SEJM-Konferenco ĉe "Aktuale" ekaperas informfolio ruslingva, destinata ĝuste por informado al urbaj (lo-kaj) instancoj. La ĉefa regulo, kiun devas konsideri ĉiu E-aktivulo, estas retajpi la folieton per tajpilo en necesa kvanto, kaj neniu-okaze uzi la ĉe-"Aktuale"-an folieton mem. Dum la retajpo ellasu el la titolo la numeron, lasante la monaton kaj jaron. Ankaŭ ne indiku la plej lastan frazon ("Kompilis Gonĉarov") kaj eble entajpu, ke kompilis iu el viaj klubanoj. La pra-folion lasu en la klubo.

Se vi havas iujn eĉ malproksime konatojn en urbaj komsomolaj kaj partiaj instancoj, en radio aŭ redakcioj de gazetoj, nepre trovu okazon viziti ilin kaj lasi (sen repreno) informa(j)n folio(j)n. Diru, ke la informfolieton kompilis viaj klubaj E-istoj.

Tiuj folioj estos "gutoj" da informo, el kiuj poste formiĝos favora rilato al E-to. Iuj povas diri: "Ha, niaj instancoj jam favoras al E-to." En ĉi-okazo oni komprenu, ke favoran rilaton oni devas "nutri" per konstanta informado.

A.Gonĉarov (Barnaul)

I n f o r m o j * A n o n c o j * P e t o j * S c i i ĝ o j

En Moskvo baldaŭ aperos rotatore multobligitaj materialoj pri la XVII Kongreso de Komsomolo, tradukitaj en E. Estas planate, ke ĉiu SEJM-klubo ricevu almenaŭ 1 ekz. Kiu bezonas pli, informu al V.Aroloviĉ: Moskvo 121019, poŝtrestante.

* * * * * * * * *

Oni jam povas aĉeti E-insignojn produktitajn en Alma-Ata. La prezo estas 15kop. Klubo sendu al G.Gercikov sumon por la necesa kvanto da insignoj plus 1 rub. pro organizaj aferoj kaj sendo. Lia adreso estas:

483310 Alma-Atinskaja obl., g.Talgar-2, ul. Kommunističeskaja 278, Gercikov Grigorij Moiseviĉ.

N.Cvileneva (Ufa)

* * * * * * * * *

La IX SEJM-Konferenco kaj SEJT-17 okazos la 4-18 de aŭgusto en Siberio. Bonvolu dediĉi viajn feriojn al tiu tempo kaj jam nun komencu enŝtrumpigi monon por la veturo.

* * * * * * * * *

La ĵus eldonita romano de Bruno Apitz "Nuda inter lupoj" havas grandan sukceson. La eldonita kvanto jam preskaŭ plene elĉerpiĝis. Por instigi plian eldonadon en E-to necesas amase reeĉi la romanon. Bonvolu sendi favorigajn leterojn al la eldonejo kaj dankesprimojn al la Centra E-Laborrondo proponante daŭrigi samsukcese eldonadon en E. La adreso estas

de la eldonejo: EDITION LEIPZIG, GDR 701 Leipzig, PSF 340;

de la Centra E-Laborrondo: GDR 108 Berlin, Charlottenstr. 60.

* * * * * * * * *

Nova subtenanto - aldonu en SL:

19. GRIGAITIS Vincas, Žemaites 1-86, 232015 VILNIUS.

Redaktis V.Ebel.

Redakcio:
656099 BARNAUL-99,
a.k. 11, "Aktuale".

APERIGO DE ESPERANTA LITERATURO DEPENDAS DE NI

La lasta SEJM-Konferenco decidis organizi vastan kompanjon por instigi eldonejojn aperigadi E-literaturon. Nur per unuigita komuna laboro ni povus venki la indiferentecon de eldonejoj. Do la lanĉata kompanjo estu afero de ni ĉiuj-aktivuloj, komencantoj kaj eĉ kursanoj.

Ĉiu klubo sendu ĉiusemajne unu aŭ plurajn leteroj(n) (oficialan, grupan aŭ privatan) al unu instanco el la listo laŭ la indikita por ĉiu urbo ordo, ĝis ĉiu klubo kontaktos ĉiujn 22 instancojn.

Subtenantoj de SEJM kaj nemembroj de SEJM, dezirantaj kunlabori, elektu por si ordon kaj kvanton laŭplaĉe.

Estroj de E-klubo estas petataj informadi pri la kompanjo siajn klubanojn kaj neSEJMajn E-istojn de sia regiono, zorge kontroladi la plenumon de la kompanjo kaj preparadi liston kun mencioj pri ĉiu unuopa letero (kiu, kien, rezulto) kaj respektivan respondon al SEJM-Konferenco. Pro la partopreno en la kampanjo la kluboj ricevu poentojn, ekzemple, po 1 poento por ĉiu letero. Detalojn decidu la SEJM-Komitato.

En viaj leteroj bonvolu atenti jenon:

- 1) por la petata literaturo tuj indiku, kiom da centoj aŭ miloj da ekzempleroj povos esti vendataj en via urbo (regiono, respubliko);
- 2) substreku la intence aŭ neintence faratan en nia lando fortegan subtenon de la angla lingvo kiel la internacia, malavantaĝe al la subteno de la rusa lingvo kaj la neŭtrala E-to, kio ege malutiligas al la politikaj, ideologiaj kaj ekonomiaj interesoj de nia ŝtato;
- 3) indiku per ekzemploj multe pli bonan staton de E-eldonado kaj E-movado eksterlande, precipe en socialismaj landoj, kaj malkovru la hontindan staton en nia lando;
- 4) niaj leteroj estu laŭeble seriozaj kaj ĝentilaj, bone argumentitaj, akurate skribitaj, nelongaj kaj ne lamentaj; el ili estu videblaj fideleco al la idealoj de nia ŝtato, amaseco kaj populareco de nia Movado;
- 5) la leteroj estu skribataj laŭeble de diversaj personoj kaj ne tro similu unu al alia;
- 6) ricevonte malĝentilan aŭ stultan, aŭ nesufiĉe bazitan respondon, preparolu ĝin en letero al superaj instancoj: la komitato pri eldonejoj kaj la centra gazetaro. Ekstremokaze (sed tre singarde, nur post nepra konsultiĝo kun la SEJM-prezidanto!) oni povus plendi al Soveto de ministroj aŭ al CK de partio, tamen tio estas evitinda.

L i s t o d e l a i n s t a n c o j

1. Direktoru izdatelstva "Russkij jzik" - 101000 Moskva-centr, Luĉnikov per. 5 (reeldoni E-rusan kaj rusa-E-tan vortarojn, eldoni E-rusan farzlibron, lernolibron de la rusa lingvo en E-to).

2. Direktoru izdatelstva "Nauka" - 103062 Moskva K-162, Podso-senskij per. 21 (eldoni E-lernolibron kaj interlingvistikan literaturon).

3. Direktoru izdatelstva "Mejdunarodnie otnoŝenija" - 129090 Moskva I-90, Meŝĉanskaja 7 (eldoni E-lernolibron kaj interlingvistikajn verkojn).

4. Direktoru izdatelstva "Viŝŝaja ŝkola" - 103051 Moskva K-51, Neglinnaja 29/14 (eldoni E-lernolibron, interlingvistikajn verkojn).

5. Direktoru izdatelstva "Znanie" - 101000 Moskva-centr, Novaja pl. 3/4 (eldoni eldoni E-lernolibron kaj popularigan broŝuron pri la Internacia lingvo).

6. Direktoru izdatelstva "Agenstvo pečati Novosti" - 109028 Moskva J-28, Podkolokolnij per. 13/5 (eldoni politikajn literaturon en E-to).

7. Direktoru izdatelstva "Molodaja gvardija" - 103030 Moskva K-30, Suŝčevskaja 21 (eldoni porjunularan literaturon en E-to).

8. Direktoru izdatelstva "Progress" - 119021 Moskva G-21, Zubovskij bul. 21 (eldoni beletran kaj sciencan literaturon en E-to).

9. Direktoru izdatelstva "Prosveŝenie" - 127521 Moskva I-521, 3-ij pr. Marjinoj roŝči 41 (eldoni E-literaturon kaj interlingvistikajn versojn).

10. Glavnomu redaktoru gazety "Knijnoje obozrenie" - 103051 Moskva K-51, Petrovka 26 (instigi eldoni unuavice E-lernolibron, ankaŭ vortarojn, frazlibron; politikan, beletran kaj sciencan literaturon).

11. Prezidentu Sojuza sovetiskiŝ obŝcestv druĝbi i kulturniŝ svjazej s zarubeĝnimi stranami - 103009 Moskva K-9, Kalinina 14 (eldoni E-lernolibron, frazlibron, politikan kaj beletran literaturon en E-to, E-kantaron, E-revuon).

12. Direktoru instituta jazikoznaniĝa - 121019 Moskva G-19, ul. Marksa-Engelsa 1/14 (instigi eldoni E-lernolibron, frazlibron kaj interlingvistikan literaturon).

13. Predsedatelju Komiteta molodjeĝniŝ organizacij SSSR - 101000 Moskva-centr, B.Ĥmelnickogo 7/8 (instigi eldoni E-lernolibron kaj porjunularan literaturon en E-to).

14. Predsedatelju Komiteta po delam izdatelstv, poligrafii i kniĝnoj trgovli Soveta ministrov RSFSR - 121069 Moskva G-69, Kaĉalova 12 (ne-RSFSRanoj skribu al la respektiva komitato de sia unia respubliko!!!) (eldoni E-lernolibron; vortarojn, frazlibron, politikan, beletran kaj sciencan literaturon en E-to).

15. Predsedatelju Komiteta po delam izdatelstv, poligrafii i kniĝnoj trgovli Soveta ministrov SSSR - 103051 Moskva K-51, Petrovka 26 (eldoni E-lernolibron, vortarojn, frazlibron, politikan, beletran kaj sciencan literaturon en E-to, lernolibron de la rusa lingvo en E-to).

16. Predsedatelju komiteta po nauke i teĝnike - 103009 Moskva K-9, Gorĝkogo 11 (malgrandigi propagendon de la angla lingvo kiel internacia lingvo de scienco avantaĝe al la rusa lingvo kaj E-to, eldonadi sciencan literaturon en E-to).

17. Glavnomu redaktoru gazeti "Komsomolskaja pravda" - Moskva A-47, ul. Pravdi 24 (instigi eldoni E-lernolibron, kaj porjunularan literaturon en E-to, publikigi artikolon pri junularaj E-kluboĝ).

18. Glavnomu redaktoru gazeti "Sovetskaja kultura" - 103055 Moskva K-55, Novoslobodskaja 73 (instigi eldoni E-lernolibron, publikigi artikolon pri laboro de E-kluboĝ).

19. Glavnomu redaktoru "Literaturnoj gazeti" - 103051 Moskva K-51, Cvetnoj bul. 30 (instigi eldoni E-lernolibron, ankaŭ vortarojn, frazlibron, politikan, beletran kaj sciencan literaturon, publikigi artikolojn pri problemo de internacia lingvo kaj pri E-literaturo).

20. Glavnomu redaktoru gazeti "Sovetskaja Rossiĝa" - Moskva A-47, ul. Pravdi 24 (instigi eldoni E-lernolibron, ankaŭ frazlibron, vortarojn, politikan, sciencan kaj beletran literaturon, lernolibron de la rusa lingvo en E-to).

21. Glavnomu redaktoru gazeti "Izvestiĝa" - 103006 Moskva K-6, Puŝkinskaja pl. 5 (instigi eldoni unuavice E-lernolibron, ankaŭ vortarojn, frazlibron, politikan, beletran kaj sciencan literaturon, vendadi sovetaĝn E-libroĝn al eksterlando, publikigi artikolon pri problemo de internacia lingvo).

22. Glavnomu redaktoru gazeti "Pravda" - Moskva A-47, ul. Pravedi 24 (instigi eldoni E-lernolibron, vortarojn, frazlibron, politikan, beletran kaj sciencan literaturon, aĉetadi E-literaturon en socialismaj landoj; publikigi artikolon pri la monda E-movado).

L a o r d o d e l a l e t e r - s e n d a d o

Barnaul komencas per N^o1, Ĉelabinsk - per N^o2, Doneck - per N^o3, Harkov - per N^o4, Hmelnickij - per N^o5, Ivanovo - per N^o6, Kaunas - per N^o7, Kedainiai - per N^o8, Klaipeda - per N^o9, Kolomna - per N^o10, Kujbiŝev - per N^o11, Leningrad - per N^o12, Lipaja - per N^o13, Maŝaĉkala - per N^o14, Moskvo - per N^o15, Miass - N^o 16, Novosibirsk - per N^o 17, Omsk - per N^o18, Poltava - per N^o19, Riga - per N^o20, Sterlitomak - per N^o21, Talgar - per N^o22, Taŝkent - per N^o1, Tiŝvin - per N^o2, Tula - per N^o3, Ufa - per N^o4, Ustj-Kamenogorsk - per N^o5, Velikie Luki - per N^o6, Viljandi - per N^o7, Vilnius - per N^o8, Zaporojje - per N^o9, Birska - per N^o10, Kapsukas - per N^o11, Kiev - per N^o12, Mejdureĉensk - per N^o13, Novomoskovsk - per N^o14, Rostov-Don - per N^o15, Salavat - per N^o16, Siktivkar - per N^o17, Soĉi - per N^o18, Sverdlovsk - per N^o19, Tallin - per N^o 20, Tbilisi - per N^o21, Tjumenj - per N^o22.

Информационный листок о новостях в мировом эсперанто-движении
№1 ноябрь 1974 г.

Венгрия

Из интервью Шандора Гаспар /Sándor Gáspár/ члена Политического Комитета Венгерской социалистической рабочей партии, главного секретаря Венгерского совета профсоюзов, одного из руководящих деятелей международного профсоюзного движения.

Вопрос: Каким образом представляются Вам языковые трудности в международном профсоюзном движении и внутри венгерских профсоюзов?

—Очевидно, что языковый барьер затрудняет международные отношения. Было бы хорошо уменьшить языковые трудности, чтобы лучше узнать и понять друг друга. Ведь наши цели и задачи отвечают общим интересам. Поэтому мы приветствуем и поддерживаем язык Эсперанто, который служит делу расширения и укрепления международных связей.

По моему мнению, Эсперанто мог бы играть значительную роль в улучшении информации о жизни и профсоюзном движении рабочих, принадлежащих к различным языковым группам. Эсперанто мог бы содействовать тому, что языковая проблема была бы менее острой, а затем была бы совсем решена....

Я думаю, что венгерские профсоюзы, в подходящий момент, выскажутся в Всемирном Совете Профсоюзов, что они считают Эсперанто полезным вспомогательным языком для взаимного знакомства, для обмена опытом, для сближения, для развития взаимоотношения.—

/Полностью интервью опубликовано в журнале "Хунгара виво"
"Венгерская жизнь", 1974 г. №5, стр.12-14 /

Куба

17 Августа 1974 года в Гаване образована Кубинская Эсперанто Ассоциация. Президентом избран О.Отеро.

"Эсперанто"/Голландия/1974, №10, с.176.

Польша

В начале мая 1974 г в Варшаве состоялся симпозиум на тему "Международный язык и геология". Было заслушано 19 рефератов и сообщений которые будут изданы на языке Эсперанто под названием "Международная геология. Том 3." Это 3-й сборник работ по геологии вышедший на языке Эсперанто в последние годы.

"Эсперанто" 1974 г. №7-8, с.137.

Румыния

Министерство культуры утвердило создание общества эсперантистов в г. Сучава под председательством профессора Иона Лазара. Это позволило организовать заочные курсы по изучению языка Эсперанто для более тысячи человек.

"Вестник Эсперанто"/Бельгия/, 1974 г. №13, с.2

Австрия

Президент Австрийской Республики доктор Кирхшлегер в письме руководителю Австрийской Социалистической Лиги эсперантистов заявил: "Я отношусь с почтением ко всем планам социалистов-эсперантистов; я считаю ценным все, что благоприятствует взаимопониманию народов мира, а Эсперанто отвечает этому."

"Вестник Эсперанто", 1974, №14, с.1

Италия

С 14 по 19 сентября в г. Верона состоялся 45 Конгресс итальянских эсперантистов. Главной темой Конгресса была: "Воспитательная ценность Эсперанто для формирования интернационалистического убеждения молодежи".

"Эсперанто", 1974, №7-8, с.137

Составил А. Гончаров /Барнаул/